

*The*  
NORTH AMERICAN  
ESPERANTO REVIEW



Esperanto Congress  
1958

---

LOGIKO      *Marjorie Boulton*  
AVENTURO      *de Bonesper*

NORDAMERIKA ESPERANTO-REVUO

Julio - Aŭgusto • 1958

# NI PETAS

KE ONI ATENTU LA ADRESON  
DE LA REVUO

La adreso citita en la Jarlibro de UEA,  
1957, estas malnova adreso.

La nuna adreso de la *Revuo* estas:

North American Esperanto Review  
2116 North 35th St., Seattle 3, Wash.,  
Usono.

La redaktoro estas:

F. R. Carlson, sama adreso.

## *The North American Esperanto Review*

Published bi-monthly by the ESPERANTO LEAGUE FOR NORTH AMERICA, INC., as its official organ. Subscription free to members. Subscription for non-members: \$1.75 per year. Other rates: Bulk orders of 15 or 30 copies of any issue may be ordered, in advance, by members, for 60c and \$1.00 respectively; gift subscriptions for schools, libraries, eminent persons, etc., and for Esperantists living in countries outside of North America, may be purchased by members for 50c per year, 3 for \$1. The *Review* reserves the right to refuse gift subscriptions for persons who should pay the higher rate.

THE ESPERANTO LEAGUE FOR NORTH AMERICA, INC., is a non-profit organization to encourage the use of the International Language, Esperanto. *Secretary*: Conrad Fisher, 808 Stewart St., Meadville, Pa. *Treasurer*: Adrian Hughes, 476 So. Bailey Ave., Hillsboro, Oregon.

*Membership Dues*: Regular Members, \$3.; Supporting Member, \$5.; Patron, \$10; Life Member, \$50; Man and wife, each having privileges of Regular Member, but receiving only one copy of publications, etc., \$4.00.

*Make all checks and money orders payable to "Esperanto League for North America, Inc."*

NOTE NEW ADDRESSES (above)  
Secretary and Treasurer of the Esperanto League for North America.

NOTE change in price of gift subscriptions (above).

## The North American Esperanto Review

(*Nordamerika Esperanto-Revuo*)

Vol. 6, No. 4.

July-August, 1958

The Review not only permits, but invites, reprinting of material from its pages, except where special notice, such as notice of copyright, appears.

*La Revuo ne nur permesas, sed invitas, represon, escepte kie aperas speciala noto limiga pri kopiado.*

CONTENTS (English)	Page
Congress Highlights .....	4
Officers of ELNA .....	4
Local Addresses .....	5
Esperanto in North America .....	7
Congress Report .....	14
Complete Grammar and Pronunciation of Esperanto.....	Inside Back Cover

ENHAVO (Esperanta)	Paĝo
Ekspozicio en St. Louis .....	1
Logiko .....	2
Lokaj Adresoj .....	5
Aventuro en Kairo .....	6
Trans la Lingvajn Barilojn .....	8
Bonvolu Skribi .....	10
Enigmoj .....	12
Idealoj de la Civilizacio .....	15
Konu Viajn Gesamideanojn .....	16

## PARDON IT, PLEASE

The name of the author, Dr. Alfonso Lomo, was omitted from the article "Zamenhof — Philologist or Poet?" in the June issue of the Review.

# The NORTH AMERICAN ESPERANTO REVIEW

Vol. 6

July-Aug., 1958

No. 4



## EKSPOZICIO EN ST. LOUIS

**S**UKCESA ESPERANTO-EKSPOZICIO estis elmontrata dum tuta majo en la Centra Publika Biblioteko en St. Louis, Missouri, kie okazos la Sepa Kongreso de ELNA en 1959.

Kvar vitraj montro-tabloj, du vitraj montro-ŝrankoj kaj ambaŭ flankoj de kvar moveblaj ekranoj estis plenigitaj per Esperantaĵoj. Ĉi tiuj estis grupigitaj laŭ diversaj kategorioj: Literaturo, studrimedoj, korespondado, internaciaj organizaĵoj, naciaj organizaĵoj, laboristaj rondoj, scienco, Unesko, religio (inkluzive liberpenpensadon), infanoj, lernejoj, Japanio kaj aliaj orientaj landoj, politiko kaj polemiko,

turismo, disvastigado per naciaj lingvoj; entute laŭ 15 fakoj. Pluraj instancoj de la biblioteko esprimis sian plaĉon pro la intereseco kaj imponeco de la ekspozicio—precipe la Ĉefo pri Publikaj Rilatoj, F-ino Josephine B. Farrington, al kiu oni direktu salutkartojn esperantlingvajn. Ŝi esprimis deziron mem lerni la lingvon. (Skribu al ŝi ĉe: Central Public Library, St. Louis, Missouri, Usono.) (*daŭrigo p. 3*)



## Logiko

**L**A TRAJNO RITME GRUMBLADIS kaj skue knaradis tra malseketa, monotona pejzaĝo. Malfruis. Ni kvar vojaĝantoj enuis. La grasulo kun ĵurnalo jam ekdormis sidante, kaj aspektis eĉ pli grasa, malbeligita per la falo de la makzelo. La virino en la purpura surtuto alterne trikis unu vicon kaj ripozigis la manojn aŭ oscedis. La mezaĝa viro antaŭ longa tempo metis siajn dokumentojn, ŝajne prikomercajn, en sian tekon, kaj sen intensa intereso penis solvi krucvortenigmon. Mi, post malsukcesa provo skribi novelon, konstatis ke mia humoro ne taŭgas, kaj ekrevis.

La komercisto finis sian krucvortenigmon kaj ĉirkaŭrigardis.

Li volis konversacii, ne por komuniki, sed pro enuo. Mi atendis la kutiman komedion.

“La vetero estis sufiĉe aĉa dum la lastaj tagoj, ĉu ne?”

Jes, la kutima komedio.

“Sufiĉe aĉa ja, sinjoro.”

Li videble serĉis ian decan pretekston por ekbabili. Lia rigardo finfine trafis la verdstelan insignon sur mia surtuto.

“Pardonu min se mi tro scivolas, sed kion signifas via insigno, fraŭlino?”

“Ĝi estas la verda stelo de Esperanto, la internacia lingvo.”

“Esperanto!” Li preskaŭ ekkriis, kaj la grasulo moviĝetis dum dormo. “Ĉu kelkaj homoj ankoraŭ uzas Esperanton? Mi kredis ke ĝi mortis antaŭ multaj jaroj!”

“Ho ne, sinjoro. Mi uzas ĝin praktike

preskaŭ ĉiutage.”

“Ĉu oni povas ankaŭ paroli ĝin? Iu diris al mi, ke Esperantistoj ne komprenas unu la alian.”

“Mi uzis ĝin por kelkaj tre gravaj intervjuoj kaj intimaj konversacioj. Ho, sinjoro, vi devus iri al Universala Kongreso. Tie vi trovus multan ĝojon kaj intereson, vi trovus . . .”

Nu, eble mi eraris. Kiam mi sursidas mian amatan ĉevalon, mi eble tro inklinas kredi ĝin ia Pegazo, kaj parolas eĉ tro entuziasme, tro fanatikece. Mi prelegis iomete; eble iom preter la limoj de ĝentileco mi aŭskultigis la komerciston; sed mi ĉagreniĝis, kiam mi rimarkis ironian rideton, kiu klare indikis malestimon, larĝiĝi sur lia vizaĝo.

“Tre interese . . .” li diris per la voĉtono de homo kiu tute ne interesiĝas. “Tamen”

— kaj nun, videble, li venke frapis, la temo estis finfinita por ĉiam — “mi ne povus ŝati aŭ uzi artefaritan lingvon. Mi preferas uzi ion naturan, ion realan.”

“Sed, sinjoro, ĉu ĉiu lingvo ne estas ia-sence artefarita? Zamenhof ja intence el-laboris la regulojn, sed ĉu la posta evoluo, per homaj rilatoj kaj literaturo, ne estas same natura fenomeno kiel la evoluo de iu ajn nacia lingvo?”

La komercisto rigardis min tra siaj okulvitroj.

“Vi parolas nun iom tro profesore, tro ovokapece, por mi. Mi estas simpla homo!” li asertis, kun la kutima fiero de nescianto pri sia nescio. “Sed mi instinkte sentas, ke ĉio, kio ne estas natura, estas malbona, kvazaŭ malsana.”

Ni ja tediĝas pri tiuj samaj argumentoj, kiujn spertaj Esperantistoj jam refutis multfoje. Mi malfermis la buŝon por paroli iom akre, sed bridis min. Ne; tiu sinjoro videble havis ĝenojn pri siaj porcelanaj dentoj; mi ne volis esti malafabla. Mia kompatemo kreskis kiam mi rimarkis ke sur la dekstra orelo li portas diskretan etan aŭdhelpon. Mi suspektis ke pro la longa vojaĝo en la varma kupeo lia virkorseto iom ĝenas lin ankaŭ. Mi ne certis ke li portas tian helpon, kompreneble; sed lia formo ŝajnis al mi iom suspektinda.

Mi ne volis argumenti akre; sed li vere agacis min per tiu konstanta ripetado de tiu vorto *artefarita* kaj tiu absoluta rifuzo sincere konsideri la signifon de sia batalkria vorto. Mi penis klarigi la veran vivecon de Esperanto; vane. Li ne volis kredi. Mi eĉ penis iom preparoli la vivantan idealon de Esperantismo; eĉ pli vane; li tiam rigardis min preskaŭ kompateme. Finfine mi ŝanĝis la temon por ne koleriĝi.

Ni preparolis niajn karierojn. Li vendis margarinon kaj peklitaĵojn. Li adoris televidon kaj lia favorata plado estis salmo-konservaĵo kun terpomoj kaj majonezo.

Li parolis agrable kaj iom fiere pri sia bela tutelektra hejmo; kun elektra bakforno, suĉpurigilo, frigorŝranko, elektra akvovar-migilo, elektra kuireja miksaparato kaj aliaj utilaj aĵoj.

Finfine ni vidis la lumojn de la lasta stacidomo. Ĉiuj ekĝojis.

“Do, ĝis la revido!” li diris al mi. “Kaj bonan ŝancon kun tiu via artefarita lingvo, kvankam mi kredas ke ĝi neniam ajn portos fruktojn! Ĝis la!”

Li foriris fiere. Bedaŭrinde li ne vidis la portiston kun stango, kiu batis lian peruketon teren.

Marjorie Boulton

### SVISA FROMAĜO

el *Cent Ĝojkantoj* de Marjorie Boulton

Kiel klarigi tion sen

absurdo mi ne scias. Jen

mi provos; venu, vorta vero!

Al mi tre plaĉas la grujero;

sed ĉu mi montras nun malsaĝon?

Mi sentas, ke troviĝas ĝuoj

eĉ en la gusto de la truoj!

ST. LOUIS

(*daŭrigo el paĝo 1*)

Okaze de la ekspozicio, la televida stacio KTVI disvidigis 11-minutan intervjuon pri Esperanto. Oni planas kurson por komencantoj ekde septembro en ĉambro senpage disponigita de la bibliotekaj instancoj.

Estas intencate fari veturantan ekspozicion por elmontri aliloke en Usono la kolektitajn esperantaĵojn, kaj oni volas daŭre ricevadi ekspoziciindajn materialojn el ĉiuj sferoj de la Esperanto-agado. Oni pretas pagi laŭ taŭga maniero kontraŭ uzeblaj sendaĵoj. Sendu al: George Falgier, 3622 North Market, St. Louis 13, Missouri, Usono.

*Redaktora noto:* La Kongreso en San Diego decidis transdoni al la migranta ekspozicieo librojn nun posedatajn de la Ligo.

## CONGRESS HIGHLIGHTS

The three-act comedy "Komerca Geedziĝo" presented by Mrs. Myrna Pollock, Miss Barbara Parker, Elwyn Reed and Lew Twinkle — The color film "Australia Today" with commentary in Esperanto — Colored slides and commentary by Pres. Doneis on his recent tour of Europe.

One young San Diegan visited our information desk to find out what Esperanto is. He found many of us willing to explain its simplicity, its regularity, its usefulness in international contacts and the urgent need for such a common instrument for understanding among the peoples of the world. He acquired a dictionary and some addresses of foreign Esperantists. 24 hours later, he returned with a letter which he had written in Esperanto, ready to send it to a girl in Hungary.

As most of our readers know, Armin Doneis is President of the Esperanto League for North America, and an accomplished Esperantist. On his first evening at the San Diego Congress, he was introduced to M. V. Dorn, of Chula Vista, who did not catch his name and inquired: "Are you also afraid to speak in Esperanto?"

LESS THAN 100 PERSONS ATTENDED OUR national Congress of Esperanto. In strong contrast is a report from Leningrad, where Esperanto was a naughty word until the death of Stalin. F. Kolobanov, Leningrad correspondent for *Heroldo*, apologetically reported that, when A. Rajski, president of the Association of Esperantists in Poland, visited Leningrad, lack of advance information made it impossible to advertise the event. So his audience consisted of *only* about 200 Esperantists, gathered *for the regular weekly meeting!*

Are the Russians also going to beat us to the utilization of the international language, the most potent instrument which can be found in the battle for the minds of men?

## OFFICERS of ELNA

President: Armin F. Doneis, Sr.  
Box 105, Pharr, Texas.  
Vice-President: Dirk Brink,  
Box 5953, Metro Sta., Los Angeles 55, Cal.  
Secretary: Conrad Fisher,  
RFD 1, Meadville, Pennsylvania.  
Treasurer: Adrian Hughes,  
476 So. Bailey Ave., Hillsboro, Oregon.

## EXECUTIVE BOARD

Francis E. Helmuth,  
P. O. Box 6215, San Diego 6, Calif.  
John L. Lewine,  
50 Overlook Terrace, New York 33, N.Y.  
Wm. Harmon,  
4725 Briercrest, Lakewood 11, California.  
David B. Richardson,  
3412 North Mullen, Tacoma 7, Wash.  
Miss Roan U. Orloff,  
31 Nahanton St., Newton Centre 59, Mass.  
Elwyn C. Pollock,  
2222 Crest Drive, El Cajon, Calif.  
Thomas A. Goldman,  
719 Chapala Dr., Pacific Palisades, Calif.  
Forrest J. Ackerman, 915 S. Sherbourne  
Drive, Los Angeles 35, Calif.  
Howard G. Borden,  
1072 Stuyvesant Ave., Trenton 8, N. J.

## PATRON MEMBERS

Dirk Brink, Los Angeles, California  
Armin F. Doneis, Sr., Pharr, Texas  
Thomas A. Goldman, Pacific Palisades, Cal.  
Mrs. T. A. Goldman, Pacific Palisades, Cal.  
Mrs. Sara E. Harris, Mattoon, Illinois  
Francis E. Helmuth, San Diego, Cal.  
Mrs. Francis E. Helmuth, San Diego, Cal.  
Reed J. Irvine, Washington, D. C.  
John L. Lewine, New York, N. Y.  
Miss Roan U. Orloff, Newton Centre, Mass.  
Don Stephens, Arden, Delaware  
Glenn Turner, Middleton, Wisconsin

---

## ST. LOUIS IN 1959

## Local Addresses

The Review lists, without charge, addresses of local Esperanto groups or of Esperantists who want local contacts to form new local groups. It is not necessary that the members of such groups be members of the League. ELNA exists for the purpose of helping all who want to promote Esperanto. If you want advice on forming a local club or study group, write to: Esperanto League for North America, Meadville, Pa.

In case of a group representing some religious, political or other special interest, please state affiliation or special interest. We make no judgment, and accept no responsibility, concerning Esperantist special interest groups, but will list addresses (if in North America) so that persons of similar interests may find congenial groups.

Kanada Esperanto-Asocio: Box 52, Terminal A, Toronto, Canada.

ELNA Youth Section: Charles Powell, Route 1, Box 41-A, Wimauma, Florida.

Esperanto-Klubo de Los Angeles: 1237 N. Alexandria Ave., Los Angeles 29, Calif.

Washington Esperanto Club: Apt. 101, 2829 Gainesville St., S.E., Wash. 20, D.C.

Esperanto-Societo de San Diego: P.O. Box 6215, San Diego 6, California.

Seattle Esperanto Society: 3231 West 62nd St., Seattle 7, Wash.

Esperanto in Buffalo: P.O. Box 222, Niagara Sta., Buffalo 1, N.Y.

Esperanto Coterie of Texas: P.O. Box 805, Houston 1, Texas.

Esperanto Club of Santa Monica: 855 Franklin St., Santa Monica, Calif.

Esperanto Society of Greater New York: 767 United Nations Plaza, New York 1, NY.

Sacramento Esperanto Club, 5631 Balboa Circle, Sacramento, California.

Esperanto Society of Long Beach: R. C. Betteridge, Pres., 5409 Graywood Ave.,  
Lakewood, Cal.

Skolta Esperantista Ligo, Massachusetts-Grupo, Thomas Duncan, Grupestro,  
73 Winchester St., Brookline 46, Mass.

Kontraŭbabela Ligo de Tampa, 403 East North St., Tampa 4, Florida.

Lucy Pier, 807 Bon Air Road, Lansing 17, Mich.

H. K. Ver Ploeg, 1908 East 8th Avenue, Spokane 32, Wash.

Jarvis E. Bush, 3700 North 75th St., Milwaukee 16, Wisconsin.

Christie W. Roberts, Rose Valley, Saskatchewan, Canada.

F-ino Ethel Kelley, Birch-haven, RFD 1, Cambridge Springs, Penna.

Mr. and Mrs. Wesley Stevens, 211 North Dithridge Ave., Pittsburgh 13, Penna.

---

FISHER SAYS: Is your address correct (including zone) on mailing of the *Review* and in membership list just sent out? If not, please send correct address to secretary.

UEA wants data for its program to build up local groups. If there is an Esperanto group in your locality, meeting regularly or at odd intervals, please send the secretary a report with list of officers. Many persons request local addresses, to learn Esperanto.

---

## Esperanto League *for* North America

is building an effective movement in North America for

We need your help

**ESPERANTO NOW!**

Join now

# Aventuro en Kairo

de Ralph R. Bonesper

Mia ŝipo "Balaton", veninte el Finnlando kun ligno-kargo, estis malŝarĝata en la egiptia haveno Alexandrio. Ni anticipis almenaŭ 6-tagan restadon tie, do prezentiĝis al mi tre favora oportuno por veturi al Kairo. La ŝipestro tre afable ebligis al mi 2-tagan forpermeson kaj esprimis agrablan surprizon pri mia serioza interesiĝo vidi la piramidojn, sfinkson, mumion de Tutankhamen, ktp., dum la aliaj samŝipanoj kontentiĝis serĉi amuzadon en la fifamaj diboĉejoj de tiu havenurbo. Nun mi devas konfesi, ke vizitante Egiption mi estis pasie tentata enŝteliĝi en la haremon de iu araba ŝejko kaj nur la granda risko tien aventuri devigis min rezisti la tenton.

Antaŭ mia ekveturo al Kairo mi konsultis esperantiston loĝantan en Alexandrio, por ke mi sciu, kiel mi aranĝu mian planon plej ekonomie kaj tamen vidu ĉion interesan; kiel mi konduku kaj marĉandu kun araboj por eviti trompon kaj aventuron. Tiu samideano plej emfaze avertis min kontraŭ la gvidistoj, ĉu profesiaj aŭ volontaj. "En Kairo," li diris, "vi povos facile trovi ĉian interesajn sen helpo de gvidistoj. En ajna okazo ili trompas kaj ekspluatas la fremdulojn. Fremdulo konsideru suspekteme eĉ la ŝajne plej afablan servemon senpage ofertatan de arabo. Se tamen nepre necesas marĉandi kun arabo, oni sciu la 'arabecan' manieron de marĉandado. Se arabo ofertas al vi 'antikvan juvelon elfositan el la tombo de Tutankhamen' por \$10, li ne estos ofendita eĉ se vi nur 10 cendojn proponas por ĝi. Post kelkminuta marĉandado li tute kontentiĝos vendi al vi la \$10-an 'juvelon' por 25¢, ĉar eĉ je tia prezo reduktita li faris almenaŭ 100%-an profiton."

Alveninte en Kairo mi decidis unue orientumi min vagante sencele kelkajn horojn tra la urbo kaj klopodis ŝajnigi ke mi estas "kairano" por eviti la atenton de servemaj gvidistoj. (Multaj miloj da okcidentanoj loĝas konstante en Kairo.) Perdiĝin-

te kelkfoje mi nervozege serĉadis eliron el la stratar-labirinto orienteca, tamen mi riskis peti nenies helpon. Tiel mi fine prikonis la urbon, trovis kaj vizitis la mondfaman muzeon, en kiu oni ĵus instalas la sarkofagon de Tutankhamen.

Por vidi la sfinkson kaj piramidojn mi devis veturi per tramo ekster la urbon. Tien veturante mi estis spionata de araba gvidisto, kiu baldaŭ afablege prezentis sin montrante polican identigilon, kaj ofertis sian servon por gvidi min. Mi intence ŝajnigis nekomprenon de lia klarigado angle, france kaj germane. Nepovinte diveni mian naciecon, li elpoŝigis dikajn albumojn, sur kies paĝoj troviĝis dankesprimoj en multaj lingvoj de diverslandaj turistoj, kiuj laŭdis la servon de tiu ĉi gvidisto. Ŝovinte ĝin en mian manon, li petis ke mi indiku mian lingvon. Mi foliumis ĝin kaj skuante la kapon mi diris, "Mia lingvo, Esperanto, ne estas skribita en ĝi." Tamen surprizegis min hungarlingva rekomendo skribitan de iu hungara grafo kaj mi ne povis kaŝi mian interesiĝon antaŭ la gvidisto. Li nenion sciis hungare, nek en Esperanto, kaj li persisteme penadis konvinki min en diversaj lingvoj pri la avantaĝoj de la sperta gvidado. Por liberigi min de li mi diris, ke mi ne estas grafo, sed ordinara maristo malriĉa, tial mi ne povas pagi lian servon. "Ho, mi jam rimarkis tion," li respondis, "ke vi estas malriĉa turisto. Mi estas komprenema kaj mi ofertas al vi mian servon por pago laŭ via propra decido. Pagu kiom vi povos kaj mi estos kontenta." Nu, tio ertis vere favora offero (daŭrigo sur paĝo 11)



# Esperanto in North America

SEATTLE, WASH. — The Seattle Esperanto Society has invited ELNA to hold its Congress in Seattle in 1961, year of the World Fair. A new class of 18 beginners started July 18.

Mr. York, an Esperantist from Florida, was visiting in Seattle. Having no local Esperantists' addresses, Mr. York looked in the phone book and called the number listed to "Esperanto, U. E. A." This call resulted in two recruits for the new class.

SES has recently donated 13 volumes of Esperanto to the Public Library.

Bonnie and Francis Helmuth, of San Diego, and Charles Peterson, of Los Angeles, stopped at the Seattle-Tacoma Airport for a few hours before going on to Vancouver, B. C., for a trans-Polar flight to the Universal Congress of Esperanto. "Ne komprenas Engles" — they're using only Esperanto on the trip.

SANTA MONICA, CAL. — An Esperanto exhibit was shown at the Public Library through the first three weeks of June. The club recently donated 13 Esperanto books and a phonograph record on Esperanto pronunciation to the library.

Henry Baer, an engineer with the Ramo-Wooldridge Corporation, world famous research organization, has written an article on Esperanto for the company paper, and plans to organize a class there.

A computer specialist at the Rand Corporation has undertaken a project to program an electronic computer to translate Esperanto into English.

Newly installed officers are: President, Elwyn Reed; Vice President, Josef Holenstein; Secretary, Blanche Parker; Recorder, Myrna Pollock; Treasurer, Sedako Hayase.

THREE RIVERS, QUEBEC — The mayor of Three Rivers received a letter from the mayor of Sao Paulo, Brazil, urging him to cooperate with the local Esperantists.

TORONTO, ONT. — The Canadian Esperanto Association has a new two-language leaflet, available at 1¢ apiece, 10% off on ordeas of 500 or more. Order from:

Kanada Esperanto-Asocio, Box 52,  
Terminal A, Toronto, Ont., Canada  
Send them to your Canadian friends.

BOISE, IDAHO — Both houses of the Idaho Girls State approved a resolution providing for the teaching of the international language Esperanto. The measure was introduced by Buzzy Balch, who was chosen as one of Idaho's two representatives at Girls Nation in Washington, D. C.

## PRESS, RADIO, TV

Judith Lane, of KIRO-TV in Seattle, interviewed F. R. Carlson, editor of the *Review*, on her "People and Places" program, June 19. *Synapse* (organ of the University of California Medical Center) on April 11 carried an article by Dr. E. J. Lieberman on "Esperanto and Medicine". *N. Y. Staats-Zeitung und Herald*, May 19, reporting the planned presentation of Ibsen's "Ghosts" in Esperanto at the Congress in Mainz, reminded its readers that practically all great classics have been translated into Esperanto. *Aviation Week* for June 2nd carried a fine letter by Dr. Edmund Bartsch, Lockheed aerodynamicist, on the need for Esperanto in pilot-to-tower communication in foreign countries. Craig Harrison, radio KCBS, read to his listeners a letter on Esperanto from James Morrison and even read some Esperanto from "The World Is Getting Smaller".

---

ST. LOUIS IN '59!

# Trans la Lingvajn Barilojn

*Francis kaj Bonnie Helmuth, el San Diego, komencis lerni Esperanton en Aprilo, 1955. Post jaro kaj duono ili entreprenis unujaran vojaĝon tra Eŭropo, kaj raportis al ni.*

*S-ano Helmuth nun estas prezidanto de la gastiga klubo por nia ĉijara landa kongreso.*

VALENCIO, HISPANIO, 17 Januaro, 1957 — Preskaŭ ĉiutage ni akompanis D-ron Herrero kiam li vizitis klientojn diversloke en la urbo. Inter la haltoj ni interparolis kaj li montris al ni la urbajn interesaĵojn. Li perfekte parolas Esperanton, kaj ni lernis multajn novajn vortojn de li.

London ni eniris la turistoficejon por demandi pri prospektojn de la urbo. En Valencio oni presigis du Esperantajn prospektojn por turistoj, kiujn ni ricevis post nia peto. La oficisto komprenis nin kiam ni parolis Esperante kaj li bone sciis pri la lingvo, sed li ne parolis ĝin.

En la jaro 1933 oni nomis straton ĉi tie “Calle de Dr. Zamenhof” (Strato de D-ro Zamenhof). S-ano Hurtado, sekretario de la Hispana Esperanto-Federacio, akompanis nin al ĉi tiu strato, kaj ni fotografis la afiŝon, “Calle de Dr. Zamenhof”. Ni ankaŭ vizitis la oficejon de la Hispana Esperanto-Federacio kaj mi aĉetis kvar Esperantajn librojn por legi dum nia vojaĝo.

Trifoje ĉiusemajne D-ro Herrero gvidas Esperantan kurson ĉe la universitato dum la vespero. Merkredon ni vizitis la klason por renkonti la gestudentojn, kaj mi feliĉe rimarkis ke la plimulto el la tridek studentoj estas junaj, ĉar la estonteco de la movado estas ĉe la gejunuloj. S-ano Herrero bone gvidis la kurson per unika metodo de nur frazoj kiujn la gestudentoj devis traduki el la hispana lingvo. Li komencis la kurson antaŭ monato kaj duono, kaj jam kelkaj studentoj povis paroli kun ni post la klaso.

Ges-roj Bertram Potts, el Wellington, Nov-Zelando, estas vojaĝantaj tra Eŭropo la pasintan jaron kaj ĉijare por fari propa-

gandon por la Universala Esperanto-Asocio kaj la Esperanta movado. Ni hazarde renkontis ilin en Wiesbaden, Germanujo, dum la pasinta Novembro, kaj denove ni renkontiĝis ĉi tie en Valencio. Ĵaŭdon, vespere, mi kaj Bonnie iris al la stacidomo por renkonti la bonajn gesamideanojn el Nov-Zelando kiam ili alvenis el Barcelona per la vagonaro. La sekvantan vesperon, kun D-ro Herrero, ili parolis per la radio, rakontante pri sia eŭropa vojaĝo. Poste S-ano Potts faris bonan prelegon antaŭ kvindek geesperantistoj kaj neesperantistoj, uzante la internacian lingvon, kaj Luis Hernandez tradukis la prelegon, hispanlingve. La prelego estis la sama bona kaj interesa rakonto pri ilia hejmlando, Nov-Zelando, kiun ni aŭdis en Wiesbaden.

Dimanĉon matene S-ano Collado akompanis nin, Bonnie kaj min kaj Ges-rojn Potts, por vidi la katedralon, la provincedomon kaj kelkajn aliajn interesaĵojn en la urbo. Je la tria, posttagmeze, ni akompanis la Nov-Zelandanojn al la stacidomo kie ili foriris per vagonaro al Madrido. Ni adiaŭis ilin kun la promeso ke ni denove renkontiĝos en Londono dum la printempo, antaŭ ilia vojaĝo al Usono. Jen du bonaj, viglaj kaj laboremaj geesperantistoj.

Poste ni iris kun Ges-roj Ernesto Hurtado al ilia domo por trinki kafon kaj babiladi Esperante. Ni manĝis nuksojn kaj kukojn kaj provis vinon nomatan “Verda Stelo”. Sur la enhavmarko de la botelo oni uzas nur nian lingvon. Tiam ni promenis al la domo de iliaj parencoj, kie ni renkontis afablajn geedzojn kiuj estas la fratino kaj bofrato de S-ino Hurtado. Ŝia bofrato ne povis paroli Esperanton, sed li

studis la anglan lingvon dum kvin jaroj, kaj li provis interparoli kun mi angle. Ni ne povis interkompreniĝi, ĉar li ĉiam uzis la malĝustajn vortojn kaj li ne komprenis min eĉ kiam mi estis parolanta malrapide. Kvankam S-ino Hurtado lernis Esperanton antaŭ nur dek monatoj, ŝi helpis nin kiel tradukistino, per Esperanto. Por mi ĉi tiu okazaĵo estis, denove, pruvo ke Esperanto estas multe pli facila ol la naciaj lingvoj.

Pro nia malsperto, Bonnie kaj mi kunportis tro multajn valizojn (kvin entute) kiam ni foriris el San Diego. Ni resendis du, unu en la alia. Eĉ en nia lando tia afero estus malfacila, sed sen la helpo de Esperanto ĉi tie ne estus eble forsendi ilin. S-ano Hurtado helpis nin sendi la valizojn de la pakaĵoficejo, per sia sperto pri tiaj aferoj (li havas transportkomercon en Valencio) kaj per la tradukado de la nacia lingvo al Esperanto.

La delegito de la Universala Esperanto-Asocio en Valencio, D-ro Tudela, invitis nin al sia Esperanto-klaso en la medicina universitato, kie ni renkontis dek gejunulojn kiuj afable salutis nin. Ĉi tiu klaso kunvenas dufoje en ĉiu semajno, kaj la gestudentoj estis tre entuziasmaj pri la internacia lingvo. Ili eĉ provis paroli kun mi kaj Bonnie kaj ni povis interkompreniĝi kun kelkaj el la plej lertaj.

Jose Guzman estas leĝisto kaj deĵoras por la registaro kiel inspektoro de laboristoj, kaj li bone konas multajn arkitektojn kaj konstruistojn. Ĉar mi ankaŭ estas konstruisto, li invitis min al la urbodomo por renkonti kelkajn samfakulojn. Tie ili montris al mi multajn planojn de la urbo, kaj desegnojn por multaj novaj konstruaĵoj. Unu el la arkitektoj invitis min al duonfinita konstruaĵo por lerni pri la konstrumetodoj en Hispanio. S-ano Guzman estis la tradukisto kaj per Esperanto mi sciigis pri iliaj metodoj kaj la materialoj uzataj en la konstruaĵoj.

Kvin geesperantistoj venis al la aŭtobushaltejo por adiaŭi nin merkredon, je la deka kaj duono matene. Estis tie Ges-roj Ernesto Hurtado, D-ro Herrero, D-ro Tudela kaj la juna frato de Ernesto, Alfredo Hurtado. Kiam la aŭtobuso estis foriranta de la haltejo ni bedaŭre mansignis al la kvin bonaj geesperantistoj, kiuj estis kvazaŭ niaj parencoj dum la restado en Valencio.

CHESTE, HISPANIO, 15 Januaro, 1957. — Dum nia vizito en Valencio ni iris al la vilaĝo Chiva, tridek kilometrojn for de Valencio, por renkontiĝi kun juna esperantisto tie, S-ano Moreira. Post tagmanĝo ni kune promenis al la najbara vilaĝo Cheste, por renkonti la geesperantistojn tie. S-ano Moreira prezentis nin al membro de la grupo, Jose Soriano, juna komercisto en la vilaĝo. Kvankam la lasta aŭtobuso foriris je la sesa kaj duono vespere, li insistis ke ni restu en Cheste ĝis la kunveno de la grupo je la oka. Li aranĝis kun amikino de esperantisto lokon por nia nokta resto, kaj ankaŭ invitis nin vespermanĝi kun li. Poste, kiam ni eniris la kunvenejon, grandan ĉambron en la lernejo, ni estis surprizitaj ke jam estis proksimume dudek personoj tie. Kiam la kunveno komenciĝis ĉeestis pli ol tridek personoj, kaj la delegito sciigis nin ke pro la malvarma vetero ne tre multaj esperantistoj ĉeestas. Imagu, ĉi tiu vilaĝo enhavas nur kvin mil loĝantojn, sed pro la vikleco de la esperantistoj tie ĉi, nun estas pli ol tri cent geesperantistoj kiuj loĝas tie ĉi. Se ĉiu urbo kaj urbeto ĉie havus tiel altan procenton da esperantistoj, la movado sukcesus.

Originale Verkita Novelo  
LA SEĜO DEKTRIA  
de George E. Wagner

Havebla ĉe Esperanto League Book Service, aŭ ĉe: Geo. E. Wagner, 403 E. North St., Tampa 4, Florida  
Prezo 45 cendoj aŭ 7 steloj

## Bonvolu Skribi

La *Revuo* presas senpage (sed foje mallongigas) korespondpetojn el aliaj landoj. Tiuj anoncoj aperas nur se, kaj kiam, konvenas al la redakcio (ĝis nun ni senprokraste presis ĉiujn, kies adresojn ni povis legi), kaj ili temu nur pri korespondado en *Esperanto*. Por certigi nepran aperon, oni pagu \$1 ĝis 4 paĝvastaj linioj. Se resendadreso ne estas legebla, ĝi estas nek presebla, nek presinda, do ne presota. SKRIBU KLARE!

MALLONGIGOJ: Dez., deziras; kor., korespondi; pk., poŝtkarto; bk., bildkarto; pm., poŝtmarko; gaz., gazeto; il., ilustrita; interŝ., interŝanĝi; p. ĉ. t., pri ĉiuj temoj.

Francisko Aliaga Rocafull, Camino Viejo del Grao no. 26—16 puerta, Valencia, Hispanio. Novlernanto. Dez. kor. kun usonanoj.

Anton Brandejs, Praha 2, Školska 32, Ĉeĥoslovakio. Dez. kor. kun homoj kun nomoj Brandeis, Brandes, Brandys, k. s.

Nikola Ivanov, Opalčenska 97, Sofia 33, Bulgario. 37-jara, dez. kor. kun usona samideanino. Petas abonon al nia *Revuo* (tia donacabono kostas al ELNA-ano 30¢ por jaro), rekompencos per ½-jara abono al *Nuntempa Bulgario* aŭ *Bulgara Esperantisto*.

Tomašić Milivoj, Zagreb, M. P. Miškine 9, Jugoslavio. 38-jara dentisto, fotoamatoro kaj pianisto, dez. kor. p. ĉ. t., precipe arto, folkloro, muziko, interŝ. muzikaĵojn, diskojn, literaturon, ktp.

F. Lopes de Souza, Baturité, Ceará, Brazilo. Dez. semojn de Kudzu por erozia grundo

Helena Hrudkova, Krupinska cesta 1157, Zvolen, Ĉeĥoslovakio. Ŝiaj lernantinoj 16- ĝis 29-jaraj dez. kor. tutmonde, precipe kun norda kaj suda Ameriko.

S-ro Michal Kucin, Turgenevova 24, Košice, Ĉeĥoslovakio. Kun geusonanoj pri ekonomiaj demandoj kaj belarta literaturo.

Karl Niemetz, str. "Neofit Rilski" 54a, Sofia, Bulgario. Filmamatoro, dez. kor. kun usonaj filmatoroj pri mallarĝa (8 mm) filmo.

Wieslaw Kazberuk, Pl. gen. Bema 4 a/3, Olsztyn, Pollando. Kun esperantistoj en Novjorko, Filadelfio kaj tra Usono por fondi reciprokajn turismajn veturojn.

Stanislaw Borczycki, Kolska 4 m. 10, Szczecin, Pollando. Bk., sportoj, vojaĝoj, fotografiaĵoj.

S-ro Gustaf Svärd, Fack 510, Bergvik 2, Svedujo. Mezaĝa, kun geusonanoj.

Ljubomir Dimitrov, Car Asen 27a, Varna, Bulgarujo. 23-jaraĝa.

Zdzisław Rabecki, Lodz, 1 Maja strato 73/7, Pollando. Juna inĝeniero dez. kor. pri diversaj temoj, interŝ. pk. aŭ Esperantajn librojn.

Sachiko Sekine, nisi 1, Hokurikuso, Johana, Tojama-ken, Japanio. Komencantino 21-jara, dez. kor., interŝ. bk. kaj pm. kun usonanoj.

Hellmut Hofmann, Littau, Friedrich Schneiderstr. 30, Germanujo (DDR). Meĥanikisto 23-jara. Dez. kor. kun samaĝulo en Ameriko pri landoj kaj homoj, sporto (motorsporto); interŝ. bk.

F. J. Dubois, 2116 N. 35th St., Seattle 3, Washington, Usono. Kompostisto. Dez. kor. kun kompostisto en Brazilo.

NORDAMERIKANOJ, ATENTU! La *senpaga* anoncado en la *Revuo* estas nur por alilandanoj kiuj volas korespondi kun nordamerikanoj. Ni tiel celas provizi al nordamerikaj legantoj taŭgan aron de korespondantoj, por stimuli korespondemon en nia lando. *Nordamerikanoj pagu minimume \$1 por anonci sin.*

AVENTURO (el paĝo 6)

kaj, forgesinte la averton de la aleksandria samideano, mi konsentis esti gvidota ĝuste kiam nia tramo haltis ĉe la piramida stacio.

Estis varmega Aŭgusto, malsezona por turistoj, kaj mi estis la sola "turisto" el-vagoniĝinta. Tuj granda hordo da araboj kun kameloj kaj azenoj svarmis ĉirkaŭ min ofertante rajdigi min tra la monumenta dezerto. Mi neniam antaŭe vidis tiom da azenoj kaj kameloj. Mia gvidisto "amike" sugestis al mi dungi kamelon (aŭ azenon) por la komforta rajdo sur la dezerta sablo. Nu, esti en la Oriento kaj ne rajdi kamelon estus same kiel esti en Romo kaj ne vidi la papon. Tial mi preferis dungi kamelon. Sed la gvidisto interrompis subite: "Du kamelojn vi devas dungi. Vi certe ne volas, ke mi sekvu vin piede dum vi rajdas kamelon." Sed dungi 2 kamelojn kostus 30 piastrojn kaj mi abrupte decidis: "Piede mi iros." Sed ne estas tiel facile forskui arabon, precipe se vi jam eknegocis kun li. Ili kun la azenoj sekvis min sisteme kaj dume la gvidisto penadis konvinki min pri la azenrajda komforto, kio kostus nur duonon de la kamela rajdo. Estis vere tre malagrabla troviĝi en la mezo de tiu azena hordo kaj tio sufiĉis por ke mi decidu dungi du azenojn po 7 piastroj por mi kaj la gvidisto kaj la azenhordo ĉesis sekvi min.

Koncerne la "rajdkomforton" surazenan mi poste decidis, ke tiu estis ne nur la unua, sed ankaŭ la *lasta* rajdo mia sur azeno. Dum kelkjara marveturado mi neniam fariĝis marmalsana, sed la surazena rajdado faris min tute marmalsana kaj preskaŭ disskuis mian ostaron.

Ĉe la sfinkso mi prepariĝis fotografi kaj sugestis al mia gvidisto inviti la apude deĵorantan policanon araban, ke ankaŭ li "paŝu" en la bildon. Li diris, ke la policano certe kompleksos, sed necesos pagi al li "bakŝiŝon". (Laŭ la araba senco, "bakŝiŝ"

estas dankmono, sed laŭ la okcidenta senco oni ne multe troigus tradukante ĝin "ĉantaĝo".) Sed nun bonŝance mi ekmemoris la averton de la aleksandria samideano, tial mi preferis "forgesi" la policanon el la bildo.

Fine mi konvinkiĝis ankaŭ pri tio, ke havante gvidiston mi havas ankaŭ pli multe da ĝenaĵo kaj argumentado kaj por tiu nebezona servaĉo mi eĉ pagi devos. "Sufiĉis el via servo," mi diris al la gvidisto. "Mi volas nun pagi al vi." Kaj mi donis al li 6 piastrojn. Li protesteme ŝajnigis konsterniĝon, ke mi pagis al li eĉ malpli ol mi pagis por la azeno. "Ĉu mi ne meritas pli ol la azeno?" li demandis kolerege. Sed tiam mi jam estis firme decidinta, ke de nun mi negocos kun araboj "arabece" laŭ la aleksandria averto. Mi memorigis al li lian ofertan pri mia laŭpova pago kaj mi emfazis ke mi *ne plu* havas monon. Tiel mi sukcesis fermi la marĉandon kun li tuj. Sed antaŭ ol forlasi min li sugestis ke mi skribu rekomendon en Esperanto kaj en la hungara lingvo en lian albumon. Mi kun ĝojo bonvenigis la oportunon por venĝo kaj skribis hungare kaj Esperante en la albumon:

"Kara Samsortano Fremda: La servon de tiu ĉi fripono vi tute ne bezonas. Rifuzu lian servon, eĉ se li ofertas ĝin tute senpage. KREDU al mi, ke lia gvidado kaŭzos al vi pli multe da ĝenaĵo ol da utilo. Sen lia servo vi povos multe pli trankvile studi kaj observadi ĉion interesan en Kairo."

Sed vere li estis multe pli ruza arabo ol kia mi anticipis lin. Tro malfrue mi rimarkis, ke liaj pikantaj okuloj "legis" miajn pensojn el miaj mienaj esprimoj dum mi skribis. Li tuj postulis, ke mi traduku mian "rekomendon" al li anglan. Lia postulo skuis min el mia venĝemo, sed mi tamen sukcesis improvizi laŭdan kaj flatan rekomendon el tiu lin kondamnanta skribaĵo. Kun "Salem Alejkum" ni adiaŭtis unu la alian. (daŭrigo sur paĝo 12)

AVENTURO

(el antaŭa paĝo)

Mi reiris al la sinkso kaj, ĝuante la trankvilan solecon de senhoma dezerto, mi denove prepariĝis fotografi la sinkson. Tiam araba junulo, kvazaŭ fantomo el la dezerta nenio, ekaperis. Ŝajne li estis ege impresata kaj ravata de mia fotografa manovrado. Fine li ekkuraĝis alparoli min anglalingve: "Sinjoro, permesu ke mi klaku la fotografilon por vi." Do, kial ne, se tio feliĉigos lin? Mi lasis al li klaki mian fotoaparaton, kiu kuŝis fiksita sur postamento. Por eviti la pluan interkoniĝon kun tiu ĉi tre "komplezema" junulo mi ekpromenis al proksima piramido. La junulo vokis al mi iom malpacience, "Sinjoro, mi finis la taskon." Ĉar mi ne komprenis lin (li sciis angle nur tiujn kelkajn vortajn kaj tre misprononcis ilin) li klarigis: "Mi klakis la bildon. Vi devas pagi al mi nun." En mia konfuziĝo mi ekmemoris la aleksandrian averton pri la "arabeca" konduto, pri kiu mi nun denove ricevis lecionon. Por pruvi al li ke mi *ne* bezonis lian servon, mi demonstris al li la aŭtomatan funkcion de mia fotoaparato. Tamen, li postulis pagon, dirante ke li estas la filo de la ŝejko, kaj li arestigis min. Li sekvis min tra la dezerto dum tuta horo, postulante pagon pro "servo plenumita". Fine lia persistemo elĉerpiĝis, ĝuste kiam ankaŭ mi perdis la paciencon kaj ekmeditis doni al li duonpiastron. Li malaperis en la dezerta nenio.

Konkludante, mi tamen trovis mian viziton en Kairo interesa kaj memorinda, kaj mi tre volonte irus tien denove. Sed tiam por eviti ĝenaĵojn kaj aventurojn mi fermus la buŝon kaj la orelojn kaj ŝajnigus esti surdmutulo.

\*\*\*\*\*

Learn  
ESPERANTO

by Correspondence

ESPERANTO-by-MAIL

123 East 35 Street Brooklyn 3, N. Y.

☆☆☆☆☆☆\*\*\*\*\*☆☆☆☆☆☆

ANAGRAMOJ

Trovu almenaŭ po du anagramojn por: aglo, akso, akvi, alfo, alko, anso, apro, arbo, arko, arto, bano, boro, ĉial, dono, kelo, lumo, luno, ruso, ruto.

Sendita de A. Holzhaus. Neniu premio. Solvo kaj nomoj de solvintoj aperos en venonta numero.

SOLVO de la krucvortenigmo en la aprila numero:

Horizontale: 2, kalo; 4, kokono; 5, parabolo; 7, odo; 9, uro; 12, volumo; 13, vipuro; 14, oni; 16, omo; 17, Senegalo; 20, banano; 21, valo.

Vertikale: 1, kakao; 2, koro; 3, lobo; 5, poliso; 6, lupelo; 7, ovo; 8, dono; 10, rumo; 11, oro; 15, senato; 18, navo; 19, galo.

Solvis ĝin: H. Agnar, Wm. Walker.

Premio al Haldan Agnar.

Erara solvo sendita de N. Ivanov, en Bulgario. Malfrue venis de M. Asveld, Nederlando, solvo de la februara enigmo.

Vortkvadrato, aprilo:

I O E L N A M O R O  
L I V I V A N T A O  
L U O B E Z O N A S  
I G M E M B R O J N  
E F A R U Ŝ A K T O  
A R O V I A N A S O  
D E V O N S T E L O  
A H E L P U R I L O  
L A Ŭ E B L E I D O

Kaŝita vorto (kvara kolono): Libervole.

SUGESTU LA PLEJ BONAJN

ESPERANTAJN TRADUKOJN POR: Plywood, piledriver, loose leaf notebook, spark plug, clamshell (digging machine), slide rule, efficient ("efika" ofte ne taŭgas).

Listo sendita de Sardelo.

*Introduction to*  
**ESPERANTO**  
THE UNIVERSAL LANGUAGE  
The Third Edition . . . REVISED . . . Price \$2.00  
Sent on Five Days FREE Examination!  
BOX 792 • PLACERVILLE, CALIF.

# Idealoj de la Civilizacio

*el la prelego de Elwyn C. Pollock al la Sesa Kongreso de ELNA, 13 julio, 1958*

**N**IA CIVILIZACIO NUN TRAPASAS GRAVAN KRIZON. Ni kutime imagas, ke tiu ĉi krizo estas kaŭzita de la milito. Tio estas erara. La milito, kune kun ĉio, kio al ĝi apartenas, estas nur unu fenomeno de la katastrofo de nia civilizacio, ĉar vere, civilizacio ŝanceliĝas eĉ en ŝtatoj kiuj ne rekte partoprenis en la milito, kaj eĉ ne estis tro rekte tuŝataj.

Nia civilizacio ruiniĝis, ĉar ĝi evoluis kun pli granda forto materie ol spirite. La ekvilibro detruigiĝis. Pro la rimarkindaj eltrovoj, al kiuj subiĝas la grandaj potencoj de la naturo, tute revoluciigiĝis nia maniero de vivado. Nia scio kaj la rezulta povo riĉiĝas kaj pliiĝas ĝis nekredebla grado, kaj ni do estas en situacio por enkadrigi — por tiel diri — la kondiĉojn de la homa ekzistado, senkompare pli favore en multaj rilatoj ol eblis antaŭe. Sed en nia entuziasmo por scio kaj povo ni alvenis al erariga koncepto de la civilizacio. Ni trovalorigas la materiajn gajnojn torditajn el la naturo, kaj ne plu mense entenas la veran

signifon de la spirita elemento en la vivo. La sola maniero por eligi el la nuna krizo troviĝas en la alprenado de mondvindpunkto, kiu alkondukos nin ankoraŭ unu fojon sub la kontrolon de la idealoj de vera civilizacio, entenataj en tiu mondvindpunkto.

La idealoj de civilizacio, kiujn nia epoko ege bezonas, tute ne estas novaj aŭ strangaj al ĝi. Ili estis jam en la posedo de la homo, kaj estis trovataj en multaj antikvaj formularoj. Fundamente, ni devas fari nenion alian ol redoni al tiuj idealoj la respekton, laŭ kio ili estis unue aprobitaj kaj akceptitaj, kaj denove serioze konsideri ilin rilate al la realeco kiu kuŝas antaŭ ni por nia traktado.



## DONATIONS TO THE REVIEW

From Glenn Turner, \$4.48 — from book sales by Esperanto League Book Service to:

Paul Crotzer, Mrs. A. W. Billing, Major Richard Quin, Mrs. J. J. Hamlin, Jr., Addie Tidwell, Carl Eshelman, Bernard C. Ballard, Buzzy Balch, W. S. Rhodes, Julius T. Beecker, Mrs Douglas M. Kelt, Mrs. Mollie Neiland, Rev. Charles W. Cox.

ERIE BOOK STORE, 7 East 8th St., Erie, Pa., stocks "Teach Yourself Esperanto" and accepts orders from surrounding area.

## CONRAD FISHER SAYS:

We really ought to receive bimonthly or semi-annual reports from all local groups to publish on our "Esperanto in North America" pages. This would make a much better impression on non-Esperantists who see a copy of our periodical. Such reports should contain information on local and area activity to publicize and promote Esperanto in the concerned area, social activities for members and guests, new members, deaths, classes, study of Esperanto literature and the movement, etc.

If we get enough response, we'll work out a special form to be sent to local clubs for easily making out reports.

HOW ABOUT YOUR



LOCAL BOOKSTORES?

# Congress Report

Friday, July 11, 1958, 10:00 a.m.



THE FIRST MEETING was opened by singing the Esperanto hymn.

Opening speeches welcoming the members were made by Francis Helmuth, president of the congress committee; Armin Doneis, president of the Esperanto League for North America; Dirk Brink, vice-president of ELNA; Donald E. Parrish, chief-delegate of the Universal Esperanto Association; Ferd Carlson, editor of the North American Esperanto Review, and veteran Esperantists Joseph Scherer and Germaine Chomette.

Telegrams and letters wishing a successful convention were read by Helmuth. Telegrams were received from Mrs. Eda Sayers and John L. Lewine; letters from U.E.A. president, Giorgio Canuto, Heroldo editor Teo Jung, F-ino. M. Vermaas of the Central Office of U.E.A., and from various Esp-ists in Belgium, Germany, Rumania, Spain, Hungary, South Africa, Bulgaria, and Canada.

The following committees were appointed by the President:

*Secretaries:* Mrs. F. Helmuth, Mr. Elwin Reed, Mrs. B. Parker.

*Reports:* Mr. Brink, Mr. Chomette, Mr. Goldman, Mr. Helmuth, Mr. Parrish.

*Resolutions and Proposals:* Mr. Scherer, Mr. Peterson, Mrs. Parrish, Dr. Witt, Mr. Dillinger.

*Ballots:* Mr. Harmon, Mr. Barta, Mrs. Chomette, Miss Craig, Mr. Agnar.

*Communications:* Miss Peggy Doneis, Miss Barbara Parker.

The President's Report was presented.

The Secretary's Report was presented on tape and accepted.

Report was presented by Ferd Carlson, editor of the North American Esperanto Review.

Report on Membership presented by William Harmon, and accepted.

Meeting closed at 12.00.

Saturday, July 12, 1958. 9:00 a.m.

## SECOND MEETING

William Harmon presented the Report

of the Ballot Committee. Of 71 ballots received, 68 ballots were valid. Results were as follows:

<i>Treasurer</i>		<i>Ex. Board</i>	
Robt. Betteridge	19	Howard Borden	47
Adrian Hughes	44	Wm. Harmon	55
Edward Pharo	2	John Lewine	50
		K. Verploeg	38
		Jarvis Bush	1
		Reed Irvine	1
		H. E. Dillinger	1
		Glenn Turner	2

The following were elected:

*Treasurer:* Adrian Hughes

*Ex. Board:* H. G. Borden  
William Harmon  
John Lewine

Discussion followed by Doneis, Carlson, Parrish, Goldman, and Helmuth. Report accepted.

Dirk Brink presented the Report of the Committee on Officers' Reports, which was accepted.

Thomas Goldman presented the Report of the Finance Committee, which was accepted.

Joseph Scherer presented the Report of the Resolution and Proposal Committee, which was accepted. Resolutions are as follows:

That the Executive Board of ELNA accept the invitation of the Esperanto Club of St. Louis to receive the 1959 convention in St. Louis.



That the President of ELNA immediately answer the telegram from the St. Louis Convention and Publicity Bureau.

That sincere thanks be sent to Prof. Canuto for his letter, together with wishes for a successful convention in Mainz and continual progress of the Universal Esperanto Association.

That the price of gift subscriptions to the North America Esperanto Review be raised to fifty cents (\$0.50) yearly, or three for one dollar (\$1.00).

That sincere thanks be expressed to Ferd Carlson for his devoted work editing the Review.

That thanks be expressed to the Local Convention Committee for their work arranging the congress.

That thanks be expressed to the local Convention Bureau for their help and hospitality.

That all Esperantists explain to their friends and to business enterprises on favorable occasions that Esperanto is a serious and practical instrument for international trade and world travel, for universal understanding and world peace.

Discussion followed by Harmon and Doneis.

Joseph Scherer proposed that the membership list of ELNA not be printed or distributed to members except on written request. Members voted and approved.

Meeting closed at 12:00.

*Sunday, July 13, 1958, 9:40 a.m.:*

#### THIRD MEETING

Telegram read from San Francisco Club president.

It was proposed and approved that books received from Adrian Hughes be put in the Traveling Exposition.

Candidates were named for the vacant position of Chairman of the Publicity Committee, as follows:

Dirk Brink  
R. C. Marble

Candidates were named for the Nomination Committee, as follows:

Elwin Reed  
Charles Peterson  
Dr. Charles Witt  
Mrs. Donald Parrish  
Glenn Turner

They will nominate candidates for the election in 1959.

The following candidates were named as a committee to study the language problems of "Americanisms," such as 'freeway', 'hamburger,' etc.

Ferd Carlson  
Donald Parrish  
Joseph Scherer  
Charles Chomette  
Sardelo

It was voted and accepted, with the decision that the official name of this committee be decided later.

After the short nondominational service, consisting of a hymn sung by Peggy Doneis, speech by Elwyn Pollock, and reading of "La Vojo," by the President, the Congress adjourned at 11:42 a.m.

#### SPECIAL SESSION (July 12) OF EXECUTIVE BOARD

It was approved that the 1959 convention of ELNA be held in St. Louis.

#### CONGRESS DAZE



"Says he's a 'samideano', your Honor, whatever that is."

## KONU VIAJN GESAMIDEANOJN



William Walker kaj Famulio

William (Bill) Walker, la nova artisto de la *Revuo*, naskiĝis antaŭ tridek du jaroj en San Diego, sed ne memoras, ĉu tiam estis Esperanta kongreso tie. Kun la gepatroj li transloĝiĝis al Napa, California, kie lia patrino, S-ino Martha Walker, nun estas UEA-delegito, instruas klason kaj vigle laboras por nia afero.

Post tri jaroj en la mararmeo, li studis dum kvar jaroj ĉe artlernejoj en Los Angeles kaj Meksikio. (Li studis ne karikaturon, sed belarton). Pro sia amo al la belo, li edzinigis al si meksikan belulinon. Li nun loĝas en Novato, California. Li estas ekspedisto en poŝtoŝeĉejo. (Sed, kiel artisto de la *Revuo*, li mondfamiĝas kaj eble baldaŭ havos novan karieron.)

Li estas komencanto (unu jaron en la movado), sed jam decidis dediĉi sian vivon al Esperanto.

Eŭropano en Hong Kong metis sur tombon de amiko florojn. Ĥino venis kaj sur najbaran tombon metis pladeton da rizo. La eŭropano ne povis sin regi, demandis al la ĥino, "Kiam do vi kredas ke venos via mortinta amiko por manĝi la rizon?" La ĥino klinis la kapon flanken, fermis la okulojn, kaj per milda voĉo diris, "Mi supozas, dum la sama tempo kiam via mortinta amiko venos por flari la florojn."

By May first, fifteen hundred persons were already signed up to attend the Universal Congress of Esperanto in Mainz, Germany, in August. These annual congresses are usually attended by about two thousand persons, from all countries. No translations are used. Esperanto is the only language permitted.

The city of Mainz, Germany, has decided to produce its film, "In the Wake of the Past," in Esperanto, the first presentation to be at the Universal Congress of Esperanto, to be held there in August.

International Vacation Courses in Esperanto will be opened in Munchenweiler Castle right after the Universal Congress in Mainz. Program includes study, working together, leisure time in the castle park and forest, lectures, debates, music, games, movies. Esperanto will be taught by the speed method of Dr. W. Perrenoud, director of the course.

● The Forty-Second British Esperanto Congress, last April in Edinburgh, opened with a speech by Lord Mathers, who accepted copies of *Angla Antologio* and *La Sankta Biblio* for the library of the House of Lords. These are the first Esperanto books on the shelves of this library.



"Esperanto estas tiel simpla, ke eĉ kato povus lerni ĝin."

# Complete Grammar, Alphabet and Pronunciation of Esperanto

## THE ALPHABET

a, b, c, ĉ, d, e, f, g, ĝ, h, ĥ, i, j, ĵ, k, l, m, n, o, p, r, s, ŝ, t, u, ŭ, v, z.

The sounds of the vowels (a, e, i, o, u) are the vowel sounds in: "Are there three or two?" The consonant sounds are as in English, except: *c* as *ts* in *hats*, *ĉ* as *ch* in *church*, *g* as in *go*, *ĝ* as *gem*, *ĥ* as *ch* in *loch*, *j* as English *y*, *ĵ* as *z* in *azure*, *s* as in *so*, *ŝ* as English *sh*, *ŭ* as English *u*.

## THE GRAMMAR

1. There is no indefinite article; there is only a definite article (*la*) alike for all sexes, cases and numbers.

2. Substantives end in *o*. To form the plural, *j* is added. There are only two cases: nominative and accusative; the latter is obtained from the nominative by adding *n*. Other cases are expressed by prepositions (genitive *de*, dative *al*, ablative *per*, etc.)

3. The adjective ends in *a*. Case and number as for substantives. The comparative is made by means of the word *pli*, the superlative by *plej*; with the comparative the conjunction *ol* is used.

4. The fundamental numerals (not declined) are: *unu*, *du*, *tri*, *kvar*, *kvin*, *ses*, *sep*, *ok*, *naŭ*, *dek*, *cent*, *mil*. Tens and hundreds are formed by simple junction of the numerals. To mark the ordinal numerals, *a* is added; for the multiple *obl*; for the fractional, *on*; for the collective, *op*; for the distributive, the preposition *po*. Substantive and adverbial numerals can also be used.

5. Personal pronouns: *mi*, *vi*, *li*, *ŝi*, *ĝi*, *si*, *ni*, *vi*, *ili*, *oni*; possessives are formed by adding *a*. Declension as for substantives.

6. The verb undergoes no change with regard to person or number. Forms of the verb: time *being* (present) takes the termination *-as*; time *been* (past) *-is*; time *about-to-be* (future) *-os*; conditional mood

*-us*; imperative mood *-u*; infinitive *-i*. Participles (with adjectival or adverbial sense): active present-*ant*; active past-*int*; active future *-ont*; passive present *-at*; passive past *-it*; passive future *-ot*. The passive is rendered by a corresponding form of the verb *esti* (to be) and a passive participle of the required verb; the preposition with the passive is *de*.

7. Adverbs end in *e*; comparison as for adjectives.

8. All prepositions govern the nominative.

9. Every word is pronounced as it is spelled.

10. The accent is always on the next-to-last syllable.

11. Compound words are formed by simple junction of the words (the chief word stands at the end). Grammatical terminations are also regarded as independent words.

12. When another negative word is present, the word *ne* is left out.

13. In order to show *direction toward*, words take the termination of the accusative.

14. Each preposition has a definite and constant meaning; but if the direct sense does not indicate which it should be, we use the preposition *je*, which has no meaning of its own. Instead of *je*, we may use the accusative without a preposition.

15. The so-called foreign words (that is, those taken from one source) undergo no change in Esperanto, beyond conforming to its orthography; but with various words from one root, it is better to use unchanged only the fundamental word and to form the rest from this in accordance with the rules of the Esperanto language.

16. The final vowel of the substantive and of the article may sometimes be omitted and replaced by an apostrophe.

## **The North American Esperanto Review**

2116 North 35 St., Seattle 3, Washington, U. S. A.

PRINTED MATTER

Return and Forwarding Postage Guaranteed

---

The great worldwide organization to promote Esperanto  
for people of all nations, all religions, all political beliefs

IS

## **Universala Esperanto-Asocio**

Representative in U. S. A.: D. E. Parrish, 328 West 46th St., Los Angeles 37, Calif.

In Canada: W. D. B. Hackett, 362 Soudan Ave., Toronto, Ont.

MEMBERSHIP, YEARLY DUES: With Yearbook only, \$1.90; with Yearbook and magazine, \$3.75; Sustaining Member, \$5.75. Life Member, \$75.00.

---

*The ONLY North American organization affiliated with UEA is*  
**Esperanto League for North America**

*Every member of the League is a member of UEA*

JOIN NOW. Regular Member, \$3; Man and wife (each with Regular Member privileges, but receive only one copy of publications), \$4; Supporting Member, \$5; Patron, \$10; Life Member, \$50. Make checks payable to: Esperanto League for North America, Inc. Secretary: Conrad Fisher, RFD 1, Meadville, Pennsylvania.

---

READ: Heroldo de Esperanto, \$4.00 per year: La Praktiko, \$2.00.